

Manfred Hausmann,

La kantistino

tradukita de Manfred Retzlaff

Aŭskultas gastoj senmoveme
al hela fluto-melodi'.
Sur la genuon heziteme
demetas la liuton ŝi.

La fajnajn brovojn ŝi volbigas,
silentas flutoj ĉie ĉi.
Nun siajn fingrojn ŝi ondigas,
dum belan kanton kantas ŝi.

La frunton levas ŝi, plonĝite
en sian ludon revas ŝi.
El la okuloj jen subite
rompiĝas brilo de ebri'.

Malhelas jam, la gastoj iras,
revenas iu vir' al ŝi.
Pri feliĉego sia miras,
ektimas tamen ŝi kaj li.

*Traduko de la Germana poemo "Die Sangerin" de MANFRED HAUSMANN (*1898-09-10 – †1986-08-06) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-928-1861 (2013-10-04 22:14:08)